




star^Eto

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIÓ



25
JAROJ
DE MEM

1978 · 4 · (68)



HALTU POR MOMENTO KAJ PENSU PRI VIA SANO

De tago al tago, de jaro al jaro vi senĉese ion kaptas, ĝis maksimumo streĉante la risorton de via sano. Kiel longe vi volas ankoraŭ toleri tion? Pripensu, ke vi havas nur unu sanon - kaj ebligu al ĝi por tre modera prezo tion, kion ĝi meritas : la kompleksan kuracadon en unu el la plej antikvaj kaj rekonataj banlokoj de Eŭropo.

ĈEĤOSLOVAKAJ BANLOKOJ
- oazoj de sano, trankvilo kaj inspiro -

KARLOVY VARY
FRANTIŠKOVY LÁZNĚ
MARIÁNSKÉ LÁZNĚ
JÁCHYMOV
TEPLICE V ČECHÁCH
PODĚBRADY
JÁNSKÉ LÁZNĚ - TŘEBOŇ
JESENÍK - LUHAČOVICE
TEPLICE NAD BEČVOU

o o o o o o o o o o o



BALNEA

Reprezentanto
de ĉeĥoslovakaj
banlokoj
kaj kurac-fontoj,
Pařížská třída 11,
110 01 PRAHA 1
ĈEĤOSLOVAKIO
Tx: 122 215

KONGRESAJ TAGOJ EN VARNA



La solvo de la lingva problemo estas unu el le antaŭkondiĉoj por solvi aliajn urĝajn problemojn de la homaro, akcentis en la inaŭgura parto de la 63a Universala Kongreso de Esperanto en Varna antaŭ 4 400 ĉeestantoj el pli ol kvindek landoj kaj reprezentantoj de 13 registaroj la prezidanto de UEA H. Tonkin. Li konstatis, ke la ĉijara UK estas la dua plej amasa manifestacio de la Esperanto-parolantoj en la movada historio.

Al la kongreso transdonis la personajn salutojn de la unua sekretario de la bulgara KP T. Živkov la unua vicprezidanto de la Ŝtata Konsilantaro de la Popola Respubliko Bulgario P. Tanĉev, emfazante la porpacan mision de la internacia lingvo. Mesaĝon de la ĝenerala sekretario de UNESKO M. M' Bow legis la reprezentanto de tiu ĉi monda organizaĵo Z. Zakariev. Por Ĉeĥoslovakio alparolis la kunvenintojn la ĝenerala konsulo en Varna A. Kamenický, por la ĉeĥa kaj slovakaj Esperanto-asocioj la ĈEA-prezidanto J. Vitek. Ĉeestis ankaŭ L. Vaňková de la ĉeĥa ministerio de kulturo.

Dum la sekvaj kongresaj tagoj pluraj fakunsidoj okazis, inter kiuj la plej abunde vizititaj estis la MEM-kunveno kun proksimume 400 partoprenintoj, plue tiu pri la agado de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj la esperantologia konferenco.

Inter la premiitoj de la Belartaj konkursoj de UEA estis en la proza branĉo Š. Štimec, Jugoslavio (1-a premio), E. Tófalvi-Kníchal, Hungario (2-a premio), L. Izák, ĈSSR kaj R. A. Konstantinova, Bulgario, ambaŭ 3-a premio. En la poezia branĉo gajnis: 1. K. Long (Britio), 2. R. de Jong (Nederlando) kaj M. Nervi (Italio).



Okaze de la UK kunvenis ankaŭ la 8-a ĝenerala konferenco de MEM, kiu omaĝis la 25an datrevenon de tiu ĉi esperantista pacmovado. Ĝi elektis la novan internacian komitaton kaj sekretarion. En la prezidantan postenon estis elektita anstataŭ N. Aleksiev d-ro I. Pethes el Hungario. Mesaĝon al la konferenco sendis la prezidanto de la Monda Packonsilantaro R. Ĉandra.

(k)



■■■■■■MALFERMITA LETERO AL LA REDAKCIO DE HORIZONTO■■■■■■
■■■■■■DISPUTI SEN MISTIFIKOJ■■■■■■

Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis n-ron 15/3 (majo-junio '78) de via Horizonto.

Certe ĝi enhavas interesajn artikolojn, kvankam la revuo estas ĉefe la tribuno por prof. I. Lapenna. Sed tio estas via afero kaj ne tion mi celas kritiki. Profesoro Lapenna estas kapabla homo, sed - kiel oni povas konstati el liaj artikoloj - ne ĉiam bone informita. Bedaurinde, vi akceptas diversajn informojn kaj publikigas ilin sen ia pli profunda kontrolo. Tiamaniere li konstante perdas de sia estinta populareco kaj ankaŭ via revuo farigas malpli serioza.

Ankaŭ ĉe ni ekzistas unuopuloj, kiuj pro naiveco aŭ malbonintenco misinformas pri la situacio en nia lando kaj en la movado kun la celo, ke en okuloj de neinformitaj homoj ĉio aspektu alie. Sed pli danĝera estas publikigo de duonveraj aŭ eĉ falsaj informoj, kiel jam plurfoje okazis en via revuo.

✻ METALAJ REMIZOJ

EL STALA LADO ✻ FUNDAMENTA FARBOTAVOLO ✻ DUPARTA PORDEGO ✻ DUKLINA TEGMENTO ✻ SEN PLANKO ✻ FACILA MUNTADO AŬ SUR SUBMURO AŬ SUR EBENA TERENO

Longo 4350 mm prezo 4840.- Kčs
Longo 5290 mm prezo 5350.- Kčs
Longo 6230 mm prezo 5850.- Kčs

Larĝo 3030 mm, alto 2450 mm estas egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo elfaras kaj dum mallonga tempo liveras

INKLEMO PRAHA, produkta kooperativo, antaŭe Kovodílo

Skribajn mendojn adresu al la etkomerca fako /maloobchodní úsek/ INKLEMO PRAHA, 190 00 Praha 9, Spojovací 11, s.Řeháková tel. 83 09 49.

Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la kooperativo. Transporto per ČSAD, se ne per la propraj transportiloj de mendantoj.

REMIZOJN NI LIVERAS NUR AL PRIVATULOJ

Certe ni ne deziras kaj ne bezonas, ke vi laŭdu nin. Ni sole proponas seriozan, neofendeman diskuton.

Profesoro Lapenna denove citas "informojn" el orienteŭropaj landoj kiel en "Hamburgo en Retrospektivo" kaj informas intence aŭtari la UK en Varna (pg. 58) pri sekretaj kunvenoj en Poprad, kies celo (!) estas eventuala kreo de Internacia asocio sole de la socialismaj landoj aŭ eĉ "tute ekregi UEA-n". Mi supozas, ke profesoro Lapenna ne estas naivulo, sed ke li nur intence provokas homojn.

Tamen kian karakteron havas niaj kunvenoj, kiujn mi ankaŭ konstante partoprenas (ankaŭ tiun aŭtari Hamburgo)? Niaj asocioj havas aliajn kondiĉojn por laboro ol tiuj en okcidentaj landoj. Ni klopodas entrepreni konkretajn komunajn pasojn por subteno de la movado en niaj landoj kaj certgrade kunigi niajn gis nun negrandajn fortojn sur diversaj niveloj. Do ni integrigas niajn eblecojn kaj ĉiujare interkonsentas pri la komuna estonta laboro. Niaj kunvenoj estas regulaj kaj la financa subteno por ilia efektiviĝo estas sola "instrukcio" de niaj stataj aŭtoritatoj!

Profesoro Lapenna ne estas laŭvere informita kaj troigas nian signifon en niaj ŝtatoj, se li pensas, ke ni estas uzataj kiel strategia ilo por partipolitikaj celoj. Mi certigas profesoron Lapenna, ke en pozitiva kazo ni disponas ankaŭ pri la aliaj eblecoj ĉiufankaj. Profesoro Lapenna taksas la situacion kiel en detektiva romano. Versajne lia fantazio estas troa. Sed tio utilas nek al li nek al via revuo.

Kaj nun pri la "sekreteco" de niaj konsultigoj. Pri tiu ĉi Poprad vi informas en Horizonto laŭ nia Starto 1/78. Do ĉiuj niaj anoj (ni dissendas pli ol 2 500 ekzemplerojn) estis informitaj pri ties preparo. Estis farita eĉ granda propagando por Esperanto, tial partoprenis ankaŭ gastoj, neesperantistoj. Ni ne skribas pri la detaloj, ĉar la konsultigoj estas plenplenaj de diversspecaj duflankaj aŭ multflankaj traktadoj. Okazas, ke ni ne ĉiam trovas komunajn starpunktojn kaj tial ni ne celas publikigi nematurajn proponojn aŭ konkludojn. El tuta artikolo pri la konsultigo videblas kiel facilanime profesoro Lapenna akceptas tiujn "informojn", kiujn li bezonas aŭ deziras ricevi. Jam la fakto, ke la "informanto" pri la konsultigo en Poprad ne konas la nomojn de esperantistoj el Sovetunio, kvankam ili ĉefrolas en la tiea movado, certigas min, ke li simple "kaptis" iajn informojn en la restoracio, kie ni mangis.

En la artikolo "La politiko de sekretaj kunvenoj daŭrigata" J. Lapenna ĉelis montri sian "objektivecon"... Tuj post la UK en Varna ĉiuj legantoj de Horizonto mem konstatos lian neinformitecon.

Ni sole povas ripeti, ke niaj asocioj havas komunan intereson pri kunlaboro kaj subteno al UEA laŭ sia statuto kaj helpi la neutralecon de UEA. Ni estus vere blindaj, se ni volus ekz. nuligi UEA aŭ fondi propran asocion. Certe ni ne volas esti neutralaj en la demandoj, kiuj tuigas nian landon, la pacon, batalon kontraŭ faŝismaj kaj neofaŝismaj sistemoj.

Sed ankaŭ vi ne estas neŭtralaj en tiuj demandoj. Aŭ ĉu vi ne volas pacan kunvivon kaj kunlaboron de diversaj politikaj sistemoj, de homoj kaj nacioj? Vi ja publikigas en via revuo opiniojn, kiuj ne estas konformaj kun la niaj. Kial do laŭ vi ni ne estas neutralaj kaj vi estas? Poste do, kio estas neutraleco?

Se vi subtenas alian politikan sistemon, ĉu necesas konstante ataki nin? Ĉu ni agas same? Kiel mi jam menciis, tiuj kvereloj ne subtenas, sed subfosas la movadon. Ĉiu ja, kiu interesigis pri Hamburgo, scias la veron! Prof. Lapenna per siaj agadoj kaj karakteraj trajtoj kaŭzis, ke li nun ne estas prezidanto de UEA. (Ne nia konfidenca preparo de socialismaj landoj!) Bedaurinde li ne estas tiom memkritikema kaj eble eĉ nun ne vidas la veran situacion.

Permesu al mi kelkajn rimarkigojn al viaj artikoloj pri STARTO, DER ESPERANTIST kaj PACO. Do STARTO skribis pri la findato de la transpagoj al UK en Varna dum marto (poste ni ĝin plilongigis je unu monato ankoraŭ). Ni ja havas en la asocio ankaŭ aliajn okupojn ol nur la kongreson en Varna. Krome, ĉiuj interesitoj havis pli ol 6 monatojn por sia decido (ankaŭ laŭ STARTO) aŭ mem poste fari la transpagon pere de nia banko. Ni preparis karavanon de pli ol 300 kongresanoj.

J.T. volas esti ankaŭ sprita kiam li komentas DER ESPERANTIST kaj ĝian intervjuon kun Romeo Ĉandra. J.T. diras: "Ni kiel povas aspekti (...la Fina Akto) nun post la konkludoj de la Konferenco en Beogrado. Des pli, ke la 10-an de decembro 1978 estos solenata la 30-a datreveno de la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj".

Vere estas interesaj la faktoj, kiel aspektas fundamentaj homaj rajtoj en multaj landoj! Havi la laboron aŭ nur labor-eblecojn, sekurecon aŭ banditismo, atingi la malpermeson persekuti malgrandajn naciojn (jes, mi pensas pri mortigitaj Baskoj, kiuj petis la rajton por sia nacio) - ĉu tio ne estas Homaj Rajtoj? Ĉu la rasismo estas adekvata al la Homaj Rajtoj? Ĉu eblas doni eĉ unu ekzemplon, ke en niaj landoj oni ne havas laboron, ĉu tie regas terorismo, ĉu banditoj povas kapti kaj mortigi ĝenkulpajn homojn aŭ ĉu la minoritatoj ne povas libere vivi, ĉu en niaj landoj regas rasismo aŭ ni ne povas viziti aliajn landojn, ankaŭ okcidentajn? Aŭ ĉu ni ne havas senkoston kuracistan helpon kaj niaj infanoj ne povas senkoste studi, ĉu niaj maljunuloj vivas sen socia kaj stata helpo? Bonvolu viziti nin. Jes, nia asocio kovros viajn elspezojn kaj vi mem elektu kion vi volas vidi el nia socia vivo. Ni ĝoje ĉion organizos por vi.

Pri PACO J.T. skribas: PACO, kiel organo de MEM - Mondpaĉa Esperantista Movado, kiu estas de Soveta Unio "senkondiĉa sekvanto" (laŭ esprimo de HdE), ne povas esti neutrala, sed ĉar ni retrovas en personaro de la revuo multajn homojn, kiuj gvidas asociojn aligintajn al UEA... kaj citas 8 nomojn el kiuj sole D-ro D. Blanke kaj D. Kočvara estas estarantoj de respektivaj asocioj.

J.T. parolas pri la kunlaboro de MEM kun aliaj organizaĵoj, ekz. kun UEA, TEJO kaj "atentigas, ke UEA baldau sen-



**Tub-laminatejo kaj uzino,
la fabriko »JULIUS FUČÍK«
filia fabriko
PRODUKTAS:**

- stangojn tiritajn, poluritajn kaj senŝeligitajn de la ronda sekco
- stangojn tiritajn, de la sesangula sekco de la rektangula sekco de la kvadrata sekco de la triangula sekco de la apartaj sekco
- dratojn tiritajn en rondoj
- tranĉil-ŝtalon varmprocede laminatitan
- muldaĵojn
- elforĝaĵojn de valvoj
- medicinan draton "Osteofix"
- volvitajn transformilajn kernojn

Informoj: Obchodně technické služby
Komercc-technikaj servoj

PSČ 430 13 CHOMUTOV
TEL.: 2821 - 28 * DÁLNOPIS 0184213

konscie formos la novan sekcion de MEM". Jes, J.T. ŝatas vor-
tludojn. Sed ĉu ludo kun la p a c o ne estas danĝera? Ĉu
J.T. pensas, ke milito lasus J.T. trankvile vivi? Sole tiu,
kiu ignoras bezonojn de la aliaj, por kiu ne estas sankta
unua Homa Rajto - vivi en paco, gole tiu, kiu proprakorpe ne
spertis, kio estas milito kaj fasismo, povas ironie paroli
pri laboro de miloj da homoj kaj ilia penado por la paco
kaj generale ankaŭ pri MEM. Stulte aspektas, se la gama homo
volas konsili al la aliaj la irvojon, se tiu homo eĉ ne kon-
nas la celojn de MEM kaj tamen kritikas! Ni sendas al J.T.
almenaŭ unu broŝureton "Koncize pri MEM", ke estonte li estu
pli singarda en siaj atakoj.

Ĉar mi dubas, ke vi publikigos mian leteron komplete, tiun
ĉi leteron mi sendas ĝin kopie al pluraj redakcioj por even-
tuala aperigo.

Z. Křimský

LA SOVETIA MOVADO PROGRESAS

Ĉiujare disvastiĝas la Esp. movado en Sovetio, precipe in-
ter la junularo. Ekzemple en la jaro 1976 en la 10a Konfere-
ncio de Sovetia Esperantista Junulara Movado (SEJM) partopre-
nis 90 junaj geesperantistoj, sed en 1977 ceestis la 11an
SEJM-Konferencon jam 120 aktivuloj. Se en 1976 oni organizis
por la Esp. junularo unu tendaron kun 238 gejunuloj, tiam en
la sekva jaro okazis jam du junularaj tendaroj, en Poltava
kaj Miass /Ĉeljabinska regiono/ kun sume 326 geesperantistoj.

Inter la plej aktivaj estas la esperantistoj en Poltava,
kvankam nur en 1975 oni fondis tie la klubon, kiu nun fari-
gis ankaŭ regiona. La estraro de la Poltava kulturpalaco de
sindikatoj, kie la klubo gtuas, subtenas ankaŭ finance ties
funkciadon. Dank al tiu ĉi helpo kaj vigla subteno de la
urba kaj regiona komitatoj de KP ni organizis en majo 1976
esperantistan renkontigon, kiun partoprenis 50 aktivuloj el
13 urboj de la suda regiono. En ĝia kadro okazis ankaŭ la u-
nya konferenco de Ukraina Societo de Esp. funkciuloj. Jam en
augusto 1977 ni organizis 10tagan junularan tendaron kaj
kvintagan II-an SEJM-Konferencon.

Simile agadas ankaŭ multaj aliaj kluboj, bedaŭrinde ne
ĉiuj plene oficialiĝis. Ankaŭ SEJM ne estas oficiala, ĝi eĉ
ne havas oficialan kontakton kun la Esp. Komisiono por in-
ternaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj, kiel ĝin havas ekz.
nia klubo. Multaj oficialuloj ne imagas guste, kio estas Esp.
klubo kaj opinias, ke oni tiu nur lernas la lingvon. Ne komp-
renante iliajn taskojn, la aŭtoritatoj ofte ne volas helpi
propagandon de la internacia lingvo. Sed la kontraŭuloj de
Esperanto tute ne estas kontraŭ internaciaj ligoj kun eks-
terlandanoj. Tamen la esperantistaj kluboj ĉiutage ilin rea-
ligas, alivorte havas la samajn taskojn kiel la kluboj de
Internacia Amikeco. La diferenco estas nur en laborlingvo.

Nia klubo havas eblecon korespondi kun la tuta mondo kaj oficiale propagandi Esperanton - laborlingvon de nia klubo. Tial estas grave havi leterojn el ĉiuj landoj. Skribu al niaj kluboj varmajn, amikajn vortojn. Viaj leteroj helpos nin!

(El la letero de V.V.Grigorenko, Poltava)



Dum sia vojaĝo tra USSR en majo, aktivulo de la Ĉs- sovetia amikeca societo en OSTRAVA-VITKOVICE kaj la vicprezidanto de ĈEA D. KOČVARA (meze), renkontigis en Volgogrado kun la tieaj esperantistaj gejunuloj.

MEM•peranto]

La esperantistoj en Bor apud Tachov (okcidenta Bohemio) ligis amikecajn rilatojn inter la distrikta packonsilantaro en Tachov kaj la Packomitato en urbo Doneck (Ukraina SSR), de kie jam venis la "unuj hirundoj" - koloraj fotografiaĵoj kaj rakontado pri la historio de la urbo.

La letero sendita al la Packomitato en Doneck sugestas evoluigi ambaŭflanke porpacan agadon inter la infanoj kaj junularo, same inter la junularaj organizaĵoj. Intersangante la spertojn oni sendube trovos novajn kaj pli efikajn manierojn de la porpaca laboro. Krom la letero oni sendis ankaŭ kelkajn donacetojn: broŝuron kaj kolorajn bildkartojn kun la Esp.teksto, kiel dokumenton pri la urbo kaj la tuta distrikto, kaj ampleksan kolekton de ĉarmaj infandegnaĵoj el la tradicia konkursa "Infanoj-paco-arto." Similajn desegnaĵojn oni atendas ankaŭ de la sovetiaj geinfanoj. La ekspozicio el tiuj ĉi verkoj pretigota en Bor estos propagandcele pruntita al lernejoj, entreprenoj ktp.

La klubanoj en Bor instigas ankaŭ la aliajn rondetojn al simila kunlaboro. Ne atendu - serĉu kaj mem proponu la vojon au almenaŭ bonan ideon. Kredu, ke via iniciato estos bonvenata en la loka packomitato.

(ms)

ĈU SOLVO DE LA LINGVOPROBLEMO?

Kvankam jam post la festivalo en Kubo, niajn legantojn eble interesos la vortojn de la redaktoro de la Havana universitato E. Remedios de los Cuetos, kiujn li diris siatempe en la intervjuo por la ĉeĥoslovaka junulara gazeto "Mladý svět" :

La studentoj kaj junaj pedagogoj partoprenas en la preparoj ankaŭ laŭ siaj fakaj kvalifikoj. Tre responde oni elektas interpretigojn por unuopaj renkontigoj, speciale por simultana interpretado. Al Havano venos la tuta mondo kaj ni jam scias, ke ne ĉiam sufiĉos nur

interpretado en mondlingvoj.

Por la oficialaj renkontigoj ni havas spertajn interpretistojn, sed povas kompreneble okazi, ke enkadre de apartaj programoj tiuj studentoj, kiuj ankoraŭ ne tute komplete posedas la lingvon, renkontos malfacilaĵojn. Mi kredas, ke ili sukcesos ilin superi. La junagociam trovos ian solvon. Kaj se la knabo el iu delegacio interkonsentos pri rendevuo kun knabino el la alia kaj ili vesperĉe promenos sur la kajo Malecon, mi eĉ kredas, ke ili tute ne bezonos interpretiston.

(ARTEFARITECO KIEL BAZA (KAREL) PRINCIPO (PIĈ)

Al Esperanto oni ne povas apliki metrojn kaj mezurilojn de la okcidenteŭropaj lingvoj. Ĉar Esperanto ne estas okcidenteŭropa lingvo. Iam oni paroladis pri la tiel nomata slava spirito de Esperanto. Sendube iuj internaj mekanismoj de Esperanto similas al la slavaj. Sed Esperanto mem ne estas slava. Ĝi estas aglutina, kunmetada. En ĝia animo estas eĉ io el la hebrea deveno de Zamenhof mem. Praaj reĥoj. Tial la plej objektivaj konantoj de Esperanto kutimigis aserti, ke simple ĝi estas lingvo hindoeŭropa. Tamen tiu mirinda lingvo estas tiom fleksebla kaj ambigua, ke ĝi spitas kaj maltoleras eĉ ĉi tiun etiketon. Pro tio, ekzameninte la evoluon de nia poezia lingvaĵo, W. Auld povig konstati, ke iuj trajtoj de Esperanto estas rekte nehindoeŭropaj 1).

Ĉiukaze la plej granda avantaĝo kaj samtempe la plej granda valoro de Esperanto estas en tio, ke ĝi estas lingvo artefarita. La artefariteco de Esperanto do ne estas io, pro kio ni devus honti au ploreti, sed male io, kion ni devus ĝiam kaj ĉie fieri kaj superbe akcentadi kaj elmontradi. Ĉar ĝuste la artefariteco estas tiu kvalito, kiu donas al Esperanto nemiskompreneblan trajton de vera kaj profunda moderneco. Sed jen pro kio la artefariteco de Esperanto estas absolute neakordigebla kun naturalismo. Ĉio arta ja tute nature elkludas ĉion naturan, kaj male! Pli precize: la arto ne kopias la naturon, ĝi transformas ĝin. Tiusence ja eĉ la greka kaj renesanca artoj ne estis naturaj. Ĉar inter ili

kaj la naturo ĉiam disis ia diferenco: ĝuste tiu, kiu disas inter la naturalisma ekskludi kaj la arta elkludi!

La naciaj lingvoj evoluas neregule, okaze, hazarde. La lingvo internacia devus evoluadi regule, lauplane, lausisteme. Malgraŭ tio, tamen, inter ambau specoj de lingvoj ne ekzistas principa malsameco. Parte eĉ pro tio, ke lingvaj artefarado kaj artefarismo estas nenio ĵusĵusa, sed male io same praa kaj malnova kiel la kulturaj idiomoj mem. Tiel, konstruante la malnovan eklezian slavan, Cirilo kaj Metodio fakte konstruis iaspecan ekleziaslavan Esperanton. Sed se tio estis ebla en 862, kial gi ne estus ebla ankau en 1887? Ĉe ĉere pli malpli parencaj lingvaj alsimiligoj kaj adaptoj ne cesis okazadi ĝis nun. En 1919, surbaze de diversaj raciaj kaj politikaj rezonoj, oni reformis la rusan lingvon. Kaj ankau pli poste lingvoevoluo estis diversmaniere manipolata en Hungarujo, Suomio, Estonujo, jen en Turkujo, Izraelo kaj Indonezio 2). Se do surbaze de racia pripensado oni faris "nenaturajn" sangojn, tio pravas, ke artaj intervenoj al la lingvo estas eblaj. Kaj se oni povas racie reformi la lingvon, oni, ankau, povas racie formi, t.e. krei ĝin.

Sed la lingvaj reformoj havas ankoraŭ unu flankon. Oni entreprenas ilin por artefare korekti la ekzistantajn naturajn formojn, kiuj estas iel malbonaj, eraraj, nesuficaj, maltaŭgaj au alimaniere genaj. Kaj jen nova argumento kontraunaturalisma kaj unu plia pruvo pri la praktika malplivaloreco de lingvoformoj nur naturaj.


Tial, kreante la Lingvon Internacian, Zamenhof prave povis kredi, ke Esperanto estos multe pli logika, t.e. multe pli regula kaj sistema ol la lingvoj naciaj. Oni ja scias, ke komence li skrupule forigadis eĉ la lastajn silabojn de internaciaj vortoj, finigantaj je in, er ktp., anstatauigante ilin jen per en, jen per iu alia silabo, nur por preveni eblajn ĉoĉncidojn kaj erarojn, kaj por malhelpi respektivajn kunpusigojn kaj kunenfalojn kun la esperantaj feminaloj (femin-nomoj), er-vortoj kaj aliaj. Kaj li lasis tion sole tiam, kiam vasta uzado pruvis, ke homonimeco, komence tiom timata, praktike ne kausas iajn menciindajn genojn.

Sekve de tio Esperanto estas verko grandparte inĝeniera, lingvo de nova epoko, lingvo de la sciencteknika revolucio. Kaj tial gi ne povas esti ia prehistoria monstro, ia lingvistika tradiciaĵo kiel la franca au latina. Eĉ pli! Esperanto estas la sciencteknika revolucio mem! Sen gi vera sciencteknika revolucio estus nepensebla kaj neebla. Sen gi eĉ pensu kaj idea revolucio estus nepensebla kaj neebla. Bedaŭrinde kiel lingvo de spirita revolucio certe ne povus servi tiu sima francaĵo, kiun oni provas subŝovadi al ni nun!

Esperanto estas inĝeniera invento. Kaj el la historio de la inventoj oni scias, ke ĉiam notore fiaskadis ĉiuj eksperimentoj, kiuj volis iel imitadi la naturon. Certe tio estas stranga kaj paradoksa. Tamen ĉia sukcesa inventismo ĉiam estis kaj estas profunde kaj esence malnaturalisma kaj antina-

TUB-LAMINATEJOJ KAJ FERFABRIKOJ ■ CHOMUTOV ■

STALAJ TUBOJ



TRADICIO
KVALITO
FIDINDECO

EN TRI KONTINENTOJ - EŬROPO, ASIO, AFRIKO - ESTIS UZIĜAJ NIAJ MASTOJ PLI ALTAJ OL 350 m POR DISAŬDIGI RADIAJN KAJ TELEVIDAJN PROGRAMOJN



30 JAROJ DE KOMERCA SERVO

PRODÁVÁME

- 1 * NÁSTROJE A NÁŘADÍ
- 2 * STAVEBNÍ A NÁBYTKOVÉ KOVÁNÍ
- 3 * INSTALAČNÍ MATERIÁL PRO VODU A PLYN
STROJE, RUČNÍ DOPRAVNÍ PROSTŘEDKY, ZDVIHACÍ ZAŘÍZENÍ, VENTILÁTORY, KOMPRESORY, ZAŘÍZENÍ PRO POVRCHOVOU ÚPRAVU, SVAŘOVACÍ POTŘEBY, MĚŘICÍ PŘÍSTROJE
- 4 * KUCHYŇSKÉ POTŘEBY A KOVOVÉ VÝROBKY
- 5 * STROJÍRENSKÉ VÝROBKY PRO STAVEBNICTVÍ
- 6 * SVĚTLIDLA A ZDROJE SVĚTLA

Naše krajské závody se svou sítí obchodních oddělení, prodejen a skladů slouží socialistickým organizacím i drobným spotřebitelům v hlavních centrech spotřeby obou národních republik.

Vyzádejte si brožurku
OBCHODNÍ NÁPLŇ

NI VENDAS

- 1 * INSTRUMENTOJN KAJ ILARON
KONSTRUAJAN KAJ MEBLAN
METALGARVAJON
- 2 * INSTALMATERIALON POR AKVO KAJ GASO
- 3 * MAŠINOJN, MAN-TRANSPORTILOJN LEVILOJN, VENTOLILOJN
- 4 * KOMPRESOROJN, APARATOJN POR SURFACA ALGUSTIGO, VELD-BEZONAJOJN, MEZURILOJN
- 5 * KUIREJAJN ILAROJN KAJ METALAJN PRODUKTOJN
- 6 * MAŠINFAKAJN PRODUKTOJN POR KONSTRUADO
- 7 * LUMIGILOJN KAJ LUM-FONTOJN

Niaj regionaj fabrikoj kun sia reto de komercaj departementoj, vendejoj kaj deponejoj servas al socialismaj organizaĵoj kaj po-
etkvan-
tantaj aĉetantoj en ĉefaj aĉetcentroj de ambaŭ naciaj res-
publikoj.

Elpetu la broŝuron
OBCHODNÍ NÁPLŇ /Komerca amplekso/

TECHNOMAT

NARODNÍ PODNIK
OBCHODNÍ ORGANIZACE F.M.V.S.

Dekdu ĉavetroj pri la sindefendo

La aŭtoroj: Inĝ. J. Novák kaj Inĝ. I. Špička

(X)

Ancoraŭ pli alta tipo de la reagado estas la t.n. reagado unusignala (monosignala). Tiukaze la defendanto konstruas la situacion tiel, ke ne povu ekesti certa klaso de aferoj, kiuj estas danĝeraj por li. Estigo de tiu ĉi situacio estas por li la signalo, laŭ kiu li komencas la propran agadon. Tiu ĉi signalo povas esti nature ĉiam nur unu, sekve oni nomas la tipon de tiu ĉi reagado la unusignala (monosignala).

Sistemon de la sindefendo oni povas konstrui surbaze de la reagado kvazaŭsignala, multsignala aŭ unusignala. Estas certe evidente, ke plej bone plenumas la III-an postulaton de la sindefendo la sistemo, ĉe kiu oni uzadas la unusignalan reagadon. Tiam sistemon de la sindefendo kreis dum jaroj 1954 - 1960 en Ĉeĥoslovakio Inĝ. I. Špička (Špička) (la t.n. unusignala /monosignala/ sindefendo). El ĝi la aŭtoroj de tiu ĉi artikolaro en sekvontaj jaroj eliris, kreante la sistemojn de la sindefendo en kiu oni uzadas plejparte la reagadon multsignalan aŭ kvazaŭsignalan. Tiamaniere ekestis la t.n. sindefendo MS-1 (multsignala sistemo de la sindefendo n-ro 1) kaj la sindefendo QS-1 (KvS-1) (kvazaŭsignala sistemo de la sindefendo n-ro 1). Multajn sciaĵojn el supraj sistemoj oni aplikis ankaŭ en verkoj dediĉitaj al la teorio de la ĵudo aŭ karateo (por plifaciligiti lernadon de la sindefendo MS-1 oni kreis ĉeĥan sistemon de la karateo nomata branao /ĉeĥe: brana /) ktp.

Por ke estu la klarigo sufiĉe demonstriva, ni skizos nun koncize, kiel oni komprenas la interbatalon en la sindefendo MS-1 (kaj ankaŭ en la branao).

La defendanto temas disde sia kontraŭulo tian interdistanĉon, kiu protektas lin kontraŭ ajna atakago efektivegbla per membroj aŭ armilo de la atakanto. Por sendanĝerigi la kontraŭulon, la defendanto devas antaŭe sufiĉe pliproksimigi sin al la atakanto, ekzemple per paŝo. Sed por ke povu la defendanto kurtigi la distancon inter si kaj la atakanto senriske, li devas iamaniere aranĝi, ke la atakanto dum tempointervalo bezona al menciita translokiĝo kaj sekvanta atako ne povu efektivegi ajnan intencan aŭ hazardan agon, kiu estus al la defendanto danĝera. Al ĉi celo servas taktikaj procedoj, nomataj taktikaj elementoj. La defendanto rajtas translokiĝi al la atakanto kaj ataki lin nur post antaŭa sukcesa apliko de oportuna taktika elemento. Ajna alia kondutado evidente ne respektas la III-an postulaton de la sindefendo, sekve ĝi estas enkadre de la sindefendo MS-1 (aŭ en la branao) neakceptebla.

En la reduktita kurso de la sindefendo oni povas atingi sufiĉe daŭran senpovecon de la kontraŭulo ekzemple tiamaniere, ke oni ĵetos al lia vizaĝo ian objekton (gazetojn, manplenon da sablo, koto, ...), nokte oni povas lin brilblindigi per poŝlampeto ktp. Memkomprene esence laj-
kajn metodojn, kiuj estas uzataj en la reduktita kurso por senriskigi la atakon fare de la defendanto, oni ne povas kompari rilate al ilia efikeco kun korekte efektivegitaj taktikaj elementoj, kiujn uzadas defendanto, scianta kaj scipovanta la sindefendon MS-1.

XI.

Se oni havos eblecon utiligi en batalo ian oportunan armilon, oni feru tion. Temas kaj pri la t.n. propraj armiloj, t.e. iloj, kiujn oni fabrikis por sendanĝerigadi atakanton, kaj pri la t.n. okazaj armiloj per kiuj oni povas la proprajn armilojn anstataŭigi. La propraj armiloj estas ekzemple ponardo, pistolo ktp., la okazaj, ŝtono, kiun oni levis de tero dum la batalo aŭ senpere antaŭ ĝi, stango forigita el barilo, branĉo, botelo, martelo ktp.

Kiajn avantaĝojn alportas armiloj? Ĉi-loke ni nomu du. Ajna armilo (propra aŭ okaza) anstataŭigas ne sufiĉe harditan parton de la propra korpo de frapanto (la t.n. frapsurfaco), per kiu oni frapas. Tio estas tre grava, ĉar la rezistiveco de frapsurfacoj kaj ilia malmoleco kutime limigas efikecon de frapoj. Do ekzemple, dekjara knabo havas sufiĉe da forto por trabsati per martelo la kapon de plenkreska homo. Kontraste, plenkreska kaj eĉ tre forta homo, se li ne estas ekzercita, ne kapablas ofte pigni la kapon de la kontraŭulo sufiĉe peze por senkonsciigi lin. Estas certe klare, ke ne temas pri manko de forto.

Plua tre grava avantaĝo, kiun alportas uzado de iuj armiloj, estas pligrandigo de frapatingo. Ekzemple, se ni atakas nearmitan kontraŭulon per bastono korekte, ni atingas nian kontraŭulon per la armilo, dume li nin atingi ne povas. Se ni efektivigas la atakon tiel rapide, ke la kontraŭulo ne havas sufiĉe da tempo defendi sin (lija reago tempo + daŭro de lia defendado estas pli longaj ol estas la daŭro de nia atakado), kaj tio estas tute reala, la atakanto ne povus nin endanĝerigi dum nia atako. Se estas eble, oni ataku en la interbatalo ĉiam tiamaniere. Tre grandan atingon havas precipe la pafarmiloj.

Per armilo oni ne estas devigataj al la kontraŭulo ĉiam nur malutili. Armilo ofte fortimigas atakanton tiel forte, ke li rezignas pri siaj intencoj. Tio validas antaŭ ĉio pri la pafarmiloj. Sed ni ne forgesu, ke pafarmiloj havas siajn avantaĝojn sole tiam, se ni staras en sufiĉa distanco disde la kontraŭulo. Se ni pliproksimiĝas je atingo de la brako, la atakanto esence jam povas forbati nian manon armitan per pistolo ekster la direkton, en kiu li staras. Poste per la alia brako li povas sendanĝerigi nin uzante pezan baton. Memkomprene tute analoge povas konduki ankaŭ ni en la mala situacio, do se la atakanto endanĝerigas nin per pistolo. Estas klare, ke tiamaniere povas ataki la kontraŭulon nur persono, kiu kapablas peze frapi kaj kiu estas sufiĉe trankvila. Sub tiuj ĉi kondiĉoj estas eble efektiviĝi atakagon jam en kadre de la simpla reago tempo + daŭro de la kontraŭula defendado. Se la pistolo de la atakanto estas lokita disde la defendanto pli diste ol estas longo de lia antaŭbrako, la defendanto povas sendanĝerigi tiamaniere nur tre neatenteman kontraŭulon. Neniuokaze ni rekomendas klopodi pri elmanigo de la pistolo al la kontraŭulo per elsuba piedfrapo, kiel oni ofte enkondukas en diversaj lernolibroj pri la sindefendo. La menciita defendado estas nur komplika instrukcio por sinmortigi. Preta atakanto havas ĉiam sufiĉe da tempo elpafi pli frue ol la defendanto eĉ tuŝos lian armilon aŭ manon.

Tamen kutime ni ne estos armitaj per pistolo. Cetere la okazoj, kiam la atakanto mem endanĝerigas nin tiamaniere, ne estas tro oftaj. Tiuj, kiam la defendanto devas batali kontraŭ la atakanto armita per nepafarmilo, estas pli oftaj. Kion la defendanto feru? Plej bone estas (surbaze de la scioj kaj scipovoj atingitaj en la reduktita kurso de la sindefendo) enmanigi ŝtonon, botelon aŭ alian okazan armilon, kiun oni povas ĵeti sur la kontraŭulon, kaj komenci endanĝerigadi per ĝi la kapon de atakanto. La atakanto sekve devas elekti: aŭ pliproksimiĝi al la defendanto por ataki - en tiu ĉi kazo la defendanto trafos per ĵetita objekto lian kapon - aŭ rezigni pri siaj atakintencoj. Memkomprene la defendanto devas havi elementajn scipovojn pri ĵetado de objektoj, sed ilin li povas facile akiri per ĵetado de ŝtonoj. Neniuokaze ni povas rekomendi diversajn komplikajn defendadojn, kiujn oni priskribadas en diversaj libroj pri la sindefendo, kiuj postulas, ke la defendanto haltigu atakanton brakon de la kontraŭulo per sia brako kaj poste efektiviĝu ian luktumon, plejofte rompumon. Plimulton el tiuj ĉi batalagoj oni povas plenumi nur en tre specialaj kondiĉoj kaj probableco de ilia sukceso estas negranda (ne estas kutime plenumita la III-a postulato de la sindefendo!).

La celo de nia artikolaro estas doni al la legantoj bazajn informojn kiel procedi solvante iujn simplajn sindefendo-situaciojn kaj antaŭ ĉio, kiel ilin evitadi. En necesa amplekso ni menciis ankaŭ la pli superajn formojn de la studado de la sindefendo. Certe ne estos vane, se ni menciis ĉi-loke iujn informojn, kiuj helpas al interesatoj pri la pli altaj tipoj de la studado por orientiĝi en la problemaro.

La sciencon, kiu okupiĝas pri la solvo de la sindefendo-situacioj, ni nomas sindefendologio. La sindefendologio traktas pri la batalagoj (la t.n. batalagologio), taktiko kaj pri la t.n. mensa sinpreparo direktita laŭ bezonoj de la sindefendo. Krom tiu ĉi scienca fako ekzistas sindefendologio aplikita, kiu utiligas atingitajn teoriajn sciojn por la praktiko kaj estas reprezentata per la jam menciitaj sistemoj de la sindefendoj MS-1, QS-1 (KvS-1), sindefendo monosignala (unusignala) kaj per la ĉeĥa speco de la karateo nomata branao (oni praktikas ĝin en la rondeto de la branao en TJ Tatra Smíchov en Praha, Ĉeĥoslovakio).

Baza literaturo pri tiuj ĉi temoj ekzistas ĝis nun nature nur en la ĉeĥa lingvo. Ni eldonis jam ĉirkaŭ 20 verkojn, kiuj okupiĝas en diversa amplekso (artikoloj, broŝuroj aŭ libroj) pri diversaj flankoj de supre menciitaj aferoj. Ne mankas ankaŭ verkoj pri la teorio de la ĵudo aŭ karateo ktp. Por ke povu konatiĝi kun tiuj ĉi novaj scioj ankaŭ tiuj, kiuj ne konas sufiĉe bone la ĉeĥan lingvon, ni komencis publikigi en la Scienca revuo bazajn sciojn el la sindefendologio kaj ni intencas tion kontinui (komence pri la frapoj, poste pri la rompumoj kaj faligumoj, taktiko kaj fine ni volas transiri al la problemaro de la mensa sinpreparo). Efektivo de tiu ĉi intenco ja daŭros multe da jaroj, ĉar Scienca revuo ne estas speciale destinita al tiu ĉi temo kaj ne povas memkomprene publikigi niajn artikolojn tro ofte. Multe dependos de la intereso de la legantoj kaj de tio, ĉu niaj artikoloj verbos sufiĉe da novaj subskribantoj por la numeroj de Scienca revuo, en kiuj ili estos presitaj. Memkomprene se ekaperus novaj eblecoj por eldonadi verkojn pri menciitaj aferoj, ĉio povus plirapidiĝi.

Krom la verkoj plejparte sciencaj estas necese eldonadi ankaŭ librojn tute popularajn, destinitajn por la plej vastaj tavoloj de la legantoj. En la ĉeĥa lingvo ni mem aŭ kun kunautoroj eldonis jam kelke da libroj de ĉi tipo kaj ĉiuj estis tre rapide disvenditaj. Ekzemple la libro "Přírůčka sebeobraný QS-1" (Lernolibro pri la sindefendo KvS-1) en la jaro 1974 estis unu el kvin la plej rapide vendataj libroj de la semajno. Simile tre sukcesa estis nia libro "Kapitoly o sebeobraně" (Ĉapitroj pri la sindefendo) (jaro 1971), kiun unu el la aŭtoroj de tiu ĉi artikolaro (J.N.) jam esperantigis. Ĝia eldono nun dependas sole de tio, ĉu ni trovos oportunan eldonejon.

En la reduktita kurso de la sindefendo oni povas diri pri la mensa sinpreparo preskaŭ nenion konkretan, malgraŭ tio, ke la sindefendo estas sur ĝi bazita. Estas evidente, ke se la homo ne estas trankvila, decidiva, se li timas aŭ male, koleras ktp., oni ne povas atendi, ke li solvos racie ne sole la sindefendo-situaciojn, sed eĉ ceterajn vivosituaĵojn. Tra la mensa sinpreparo enkreskas la problemaro de la propra sindefendo en ĉiutagan vivon kun ĉiuj ĝiaj problemoj, komplikaj, vana penado aŭ sensecaj revoj. Tamen la lasta problemaro estas jam tre postuliva kaj ĉi-loke ni sekve ne povas okupiĝi pri ĝi.

Suplemento

En antaŭirantaj dekdu ĉapitroj ni povis al la legantoj nur aludi la problemaron de la moderna sindefendo, kreita en Ĉeĥoslovakio. Pli sube ni ankoraŭ montrons, kiujn problemojn kunportas studado de la batalagoj. Por ke la klarigo estu sufiĉe demonstriva, ni pritraktos (memkomprene nur tre koncize) la rektmanfrapon.

1.0. Kio estas la rektmanfrapo

Aĵnan baton, ĉe kiu la fransurfaco proksimiĝas celen laŭ linio (proksimume) rekte, ni nomas rektmanfrapo. Laŭ la maniero de efektiviĝo de la bato, t.e. laŭ specoj de la korpomovoj, el kiuj ĝi konsistas, laŭ la utiligata fransurfaco, armilo aŭ gardostero k.t.p. oni povas distingi diversajn rektmanfrapojn. Tamen por praktikaj bezonoj de la ekzerco estas necese komenci instruadon ĉe la plej universala kaj altvalora batalago. En la sindefendoj MS-1, QS-1 (KvS-1) aŭ en la branao oni elektis kiel la bazan la rektmanfrapon, montritan sur la fig.3 (la t.n. elektita efektiviĝo de la rektmanfrapo). En la plua klarigo ni eliros antaŭ ĉio de ĝi.

1.1. Priskribo de la elektita rektmanfrapo

La elektitan rektmanfrapon oni efektivas el la t.n. atakgardo-staro (fig.12a). La dekstra (+) brako estas pretumita (1) ĉe la dekstra akselo (fig.12b). La maldekstra brako estas antaŭmetita (++) (fig.12b), ĝia manplato montras malsupren. La elektita rektmanfrapo konsistas el jenaj movoj:

- 1) la movo fare de la batanta brako,
- 2) la retromovo fare de la nebatanta (retroiranta) brako,
- 3) la trunkorotacio en la direkto de la bato,
- 4) la translacio fare de la trunko en la direkto de la bato,
- 5) subita kaj forta elspiro.

- (1) PRETUMI: teni frepontan membron en pozicio (=PRETUMO), oportuna por la koncerna frapo. EN-IGI, meti frepontan membron en PRETUMON.
- (+) En tiu ĉi suplemento ni priskribas la batojn efektivigatajn per la dekstra membro. Nature, ajnan batalagon oni devas scipovi kaj per la dekstra, kaj per la maldekstra membroj.
- (++) La figurojn en la suplemento desegnis L.Špaček (Špaček).





Fig.12

LACHEMA N.P. BRNO



Estas sukeraĵo por diabetikoj

SORBIT helpas al diabetikoj ĉe por maldikiĝi

- SORBIT je přírodní sladidlo s nižší kalorickou hodnotou, které má všechny vlastnosti potřebné pro použití v kuchyni jako cukr
- SORBIT je vhodný zejména pro přípravu pečiva a moučnicků pro diabetiky
- SORBIT je použitelný jako náhrada cukru při udržování vhodné tělesné váhy
- SORBIT POMÁHÁ DIABETIKŮM ZPĚSTRIT SVŮJ JIDELNÍČEK

PRODUKTAS

** LACHEMA n.p. BRNO

uzino 6 en NERATOVICE

LACHEMA

Žádejte v prodejnách POTRAVIN, JEDNOT a DROGERIÍ

Nordbohemiaj brunkarbaj minejoj Most



HLAVNÍ PALIVOVÁ ZÁKLADNA ČSSR

Ĉefa
brulaĵ-bazo de ĈSSR

turalisma. Kiam la homo volis elpensi rapidan kaj bone funkciantan irilon, veturilon, transportilon, li ne elpensis kruron, sed - la radon, kiu havas nenian ajn ekvivalenton en la tuta naturo. Kiam li volis konstrui groton, li ne kavigis truon sub la tero, sed li ellevis Empire State Building.

Tial ankaŭ en Esperanto devas ĉeesti la ĉefaj kvalitoj de ĉiu bona maŝino: struktura simpleco kaj samtempe la plej granda teknika efikeco.

Okcidentalistoj kaj aliaj planlingvistoj senĉese atakas la artefaritecon de Esperanto. Pri ĝia konsisto Revista de Interlingua 3) informas eĉ jene: "1/3 inventate, 1/3 deformate, 1/3 natural". E. Vilborg 4) sprite nomis tiun aserton lamensogo de la jarcento. Kvankam tiu mensogo de la jarcento tamen estas eĉ ne tiom atako, kiom, paradokse, defendo kaj neesprimita fiaskokonfeso. La naturalistoj vidas, ke ilia naturalismo kondukas nenien. Naturalismo ne estas principo. Naturalismo estas nur tragedia interlingvista eraro, principeraro, direktomanko. Tiun eraron ili ne povas plu korekti. Kaj ili ne volas ĝin konfesi. Do ili, almenaŭ, provas infekti per ĝi ankaŭ Esperanton. Ilia atako tial, elplike, signifas, ke ni iras sur gusta vojo! Ĉar nur se la malamiko vin laudas, gardu vin!

Al ĉiuj ĉi atakoj, pretere ekstreme interesaj kaj utilaj, ekzistas unu sola respondo: Nur kiam pli ol 90% de la esperanta lingvomaterialo estos "elpensitaj" kaj "deformitaj" (t. e. racie ordigitaj), kaj sole malpli ol 10% naturaj (t. e. kaosaj), ni povos fine fanfaroni, ke nun Esperanto jam estas relative bona kaj perfekta!

(Daŭrigo)

NI LEGIS...

Sándor Szathmári: KAIN KAJ ABEL. Novelkolekto de la eminenta prozverkisto Esperanta, klasikulo de la hungara sciencfikcia literaturo. Liaj konataj verkoj estas Kazohinio kaj Maŝinmondo. El

la kolekto ni aparte publikigas la noveleton Genezo.

25 JAROJ. Antologio de Belartaj Konkursoj. Originallaj kaj tradikitaj eroj entute de 54 aŭtoroj. Kun antaŭparolo de H. Tonkin. - Ambau librojn eldonis Hungara Esperanto-Asocio en 1977, redaktis V. Benczik.

====KONGRESO EN BUDAPEŜTO====


Alta prestiĝo, kiun ĝuas la hungara Esp. movado manifestigis dum la 27-a kongreso de HEA en Budapeŝto (14.-16.7.). Partoprenis ĉ. 200

personoj. La agadon de la esperantistoj favore pritakis la reprezentantoj de la sindikatoj, de Hungara laborista socialisma partio, akcentante gravecon de Esp - o

MODERNA ĈIUSPECA MEBLARO

por dormocambroj, ŝrankovandoj por loĝcambroj, kuirejoj, etajmebloj: labortabloj, komodoj, ŝrankoj, angulbenkoj, k.s.; meblaro por antaŭcambroj, loĝigaj lit-ekipaĵoj,

produktas
UP FABRIKO BUČOVICE
nacia entrepreno



UP
BUČOVICE **UP** MARKO DE MEBLOJ
DE BONA TRADICIO

kiel rimedo de klerigo, de la internacia edukado kaj interpopola kunlaboro. Vicprezidanto de la Hungara Packomitato I. Terényi transdonis honordiplomojn al kelkaj Esp. kolektivoj kaj unuopuloj. Por

la eksterlandaj delegitoj kaj gastoj faris akcepton sekretario de la Centra sindikata kongilantaro k-do Vas.

Ĉeĥan Esperanto - Asocion reprezentis en Budapeŝto V. Podhradská kaj O.Knichal.

RONDETA VIVO

BRNO - En la tagoj de la 4-a ĝis la 15-a de majo realiĝis autobusa turneo de la 60 membra vira kantista ĥoro Foerster en Italio. Okazis sep koncertoj en Bolzano, Romo, Volterra, Grosseto, Vincenzo kaj Schio. Organizo de la koncertoj estis perfekta, akcepto flanke de la esperantistoj, italaj kantistaj ĥoroj kaj de la reprezentantoj de la gastigitaj urboj kaj auskultantoj estis kora kaj entuziasma. Grandan sukceson de Foerster aprenis ankaŭ anstataŭanto de la ĉeĥa ambasadoro en Romo J. Benda, kiu en la memorlibron de la ĥoro notis: "Dankon por granda ĝuo, dankon por digna vastigo de la ĉeĥa muziko, de la ĉeĥa kulturo kaj de nia socialisma patrio."

Publikan paroladon pri la temo "Internacia lingvo ekde utopio ĝis realeco" prezentis la 13.6. sekretario de la klubo Zdeněk Hršel antaŭ ĉ. 50 personoj. La prelego renkontiĝis kun vigla intereso kaj simpatioj.

Domo de Pioniroj kaj de Junularo en Brno envicigos helpe de la klubo ekde septembro en klubo de Internacia Amikeco ankaŭ sekcio Esperantan. Krom la instruado de la lingvo kaj edukado al

la internacia amikeco, estas en la programo interŝanĝado de leteroj, bildkartoj, ktp. kun infanoj-esperantistoj en la tuta mondo.

FRYDEK - MISTEK EK aranĝis la 28.5. tre sukcesan ekspozicion de porinfanaj libroj en Kulturdomo de SKP, kie omage al la Internacia Tago de Infanoj okazis du prezentadoj de Strýček Jedlička. La infanoj kune kun gepatroj, pli ol 800, ŝate rigardis ĉ. 50 libretojn en Esperanto. Samtempe estis disdonitaj multaj flugfolioj pri la okazonta Interklub. Samloke, laŭ instigo de gesamideanoj, estis aranĝita ekspozicio de ĉeĥaj libroj por infanoj. /mb/

CHFB - Grandan atenton vekis la prelegoj de RNDr J. Dvořák, CSc, pri mineralfontoj en la okcidenta Bohemio kaj tiu de P. Deák "Tra Siberio al Koreujo". Kune kun la urba kulturcentro la LG aranĝos la 20.10. vesperon de Eva Seemannová, kiu prezentos la teatraĵon "Jean kaj mi". La vespero okazos omage al la 60a jubileo de la ĉs. ŝtato.

KARLOVY VARY - Okaze de la XXI-a Internacia Filmfestivalo en Karlovy Vary EK aranĝis en vitrino de bufedo "Karlovarka" informadon pri la ĉeĥaj konkursaj filmoj en la lingvoj ĉeĥa kaj Esperanta. En la vitrino de EK afiŝo informis ĉiun

pri la projekciotaj filmoj en Somera Kinejo. - Unuafoje la humanisma devizo de la Festivalo "Por noblaj rilatoj inter la homoj, por daŭra amikeco" estis proklamita ankaŭ en la internacia lingvo. /jk/

PLZENĚ - Piedmarŝon al la monumento en Stod omaĝe al 241 viktimoj diversnaciaj de la nazioj partoprenis la urbaj esperantistoj kaj metis florkronon al la monumento.

TÁBOR - Monata publikaĵo Tábořský zpravodaj, eldonata de Urba Nacia Komitato,

KRONIKO

Forpasis honora membro de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, esperanta pedagogo, aŭtoro de esperantaj lernolibroj kaj tradukinto Theodor KILIAN. Li mortis la 3an de julio 1978 en sia 83a vivjaro. HONORON AL LIA MEMORO!

Okdekkvinjariĝon festos la 16.8. Marie ADAMCOVÁ el Brno.

* EL *

EKSTERLANDO

BELGIO - Esperanto funkcias kiel labor-lingvo en la internacia cibernetika kongreso en la tagoj la 10-an-14-an de septembro en la belga urbo Namur. Pluaj laborlingvoj la angla kaj la franca.

BULGARIO - Ĝis la 20a de julio aligis al la 63-a

daŭre enhavas rimarkinde ampleksan rubrikon Mezinárodní jazyk, sperte gvidatan de anoj de Esperanto-Klubo en Tábor.

U S T I N A D L A B E M - En konkurso pri origina Esperanta poezio, aranĝita de Goethe-Instituto en Milano estis atribuita la 3-a premio al poeto kaj tradukanto Jiří Korínek.

Z N O J M O - IG aranĝis la 5.6. amuzvesperon kun konkursoj, kantado kaj danco. - Partoprenis klubanoj kaj multaj adeptoj de la internacia lingvo. /vr/

Sepdekjara fariĝos la 8an de agosto Jaromír B A B IČKA el Lety apud Dobříčovice.

Sian vivjubileon atingis la 28an de aug. Sona Z E D N Í K O V Á el Prago kaj Zdeněk H R Š E L el Brno (la 19an de septembro).

Al geedziĝo de Zdenka V A N C O V Á kaj Ivo B R O Ŝ E K la 24an de junio en Ústí n.L. kore gratulas kaj bondeziras ĉiuj anoj de la ER.

Universala Kongreso de Esperanto en Varno 4 200 partoprenantoj el 47 landoj. En kadro de la Somera Universitato okazos 12 prelegoj de fakuloj el 9 landoj. Krome okazos Esperantologia konferenco kun paroladoj de 8 ekspertoj. - Bulgara Esperanto-Asocio havas 250 klubojn en 144 lokoj.

HUNGARIO - D-ro K. Polinszki, ministro de edukado en Hungario deklaris en intervjuo por Hungara Vivo: "Jam

de junaĝo sincere mi simpatias kun Esperanto-movado kaj kun intereso sekvas ĝian evoluon. Mi vidas grandegajn eblojn de la internacia lingvo, sed tuj mi aldiras: ĝis nun oni eluzas ilin tre etkvanke. Ĉar ĉi tiu lingvo estas pli facile ellernebla ol kiu ajn alia, kaj ĉar ĝi estigis kiel sintezo de la vivantaj naciaj lingvoj, ĝi igis vivanta internacia lingvo, kiu povus esti la plej demokratia instrumento de la internacia interkomprenigo. La ministro promesis subteni konstitucion de komisiono por apliko de Esperanto, proponita de 140 hungaraj parlamentanoj.

I T A L I O - Internacia kongreso de fervojistoj-esperantistoj okazis en Romo kun pli ol 350 delegitoj el 18 landoj. La inauguron partoprenis eminentaj reprezentantoj de la kultura kaj politika vivo en Italio. La kongreson salutis senatano A. del Nero, iniciatinto kaj prezidanto de parlamenta grupo "Amikoj de Esperanto", al kiu aligis jam 44 deputitoj.

P O L L A N D O - Okaze de "Tagoj en Bydgoszcz" efektivigis en ĉi tiu pola urbo ekde la 1-a ĝis la 4-a de junio internacia esperantista renkontiĝo, kiun partoprenis ankaŭ komitatano de EK Brno M. Malovec. La unua vespero apartenis al amatoraj teatraj grupoj. La sekvintan tagon kunsidis junularaj reprezentantoj el la socialismaj landoj kaj estis pritraktataj ebloj de kunlaboro kaj akcepto de ĉs. junulara organizaĵo en TEJO. Okazis ankaŭ vizito al Esperanto-klubejo kun reprezente instalita oficejo, kun du societaj ejoj

kaj vespere okazis granda tendarfajro ekster la urbo kaj samtempe balo en kafejo Savoj, kie ludis kaj kantis du Esperanto-kapeloj. Sabate kunsidis du seminarioj, fervojista kaj ornitologia, posttagmeze sur scenejo en Popola Parko estis publika koncerto de pluraj Esperantaj muzikaj grupoj. - Sub auspicioj de Pola Esperanto-Asocio okazos en la pola urbo Miedzygorze ekde la 3-a - 16-a de septembro jam la 14-a Internacia Esperantista Feriado "La Ora Pola Autuno", kun riĉa kultura kaj societa programoj. El la programo ni citas: seminario, konsultaj horoj pri lingvaj problemoj, ekskursoj, balo, distraj prezentaĵoj, internacia vespero, sakturniro, sportludoj, ktp. Adreso por aligo: Pola Esperanto-Asocio, str. Dubois 3, pk.16, PL 50-952 Wrocław, Pollando.

S V I S L A N D O - Preparkomitato de la 64-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta venontjare en Lucerno, jam nun eldonis grandajn belartajn afiŝojn kaj luk-sajn prospektojn.

U S O N O - Ambasadoro de Aŭstralio R. Harry parolis en la universitato de Filadelfio pri malarmado kaj pri la internacia lingvo. - UEA havas tri reprezentantojn en Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, kiuj regule partoprenas sesiojn de la neregistaraj organizaĵoj. - Unesko-Kuriero publikigis ampleksan raporton de la ĝenerala direktoro de Unesko pri lia partopreno en la Universala Kongreso de Esperanto, okazinta pasintjare en Rejkjaviko.

Jazykový koutek

"I" není vždy eĉ

Je vleklou jazykovou chybou několika českých esperantistů, jak se zdá, že překládají nesprávně českou spojku "i" vždy výrazem "eĉ". Snad na tom má vinu i nepřesnost autorů některých slovníků; např. v jednom najdeme: i - 1) eĉ, 2) /kaj/ ankaŭ.

Je však třeba, aby si chybuující uvědomili, že česká spojka "i" se překládá 1) kaj, 2) ankaŭ, nebo 3) kaj ankaŭ. Teprve má-li "i" význam ba i, dokonce, dokonce i, použijeme eĉ. Výjimečnou krátkost této české spojky nelze napodobovat v mezinárodním jazyku neuváženým používáním též krátkého slůvka eĉ ve všech případech. Všimněme si rozdílných významů na příkladech:

1) Otec, matka i syn přišli nám naproti: la patro, la patrino kaj (nebo: kaj ankaŭ) la filo... 2) Otec, matka a dokonce i syn přišli... - ...kaj eĉ la filo... Zní tedy podivně použití eĉ ve větě: Otcova pohřbu se zúčastnili synové, dcery i příbuzní (...eĉ parencoj). Použití "eĉ" t.j. "a dokonce", vyjadřuje podiv nad jejich účastí, ačkoliv za normálních okolností účast příbuzných na pohřbu není divná, nýbrž běžná, ba (ja eĉ) žádoucí. Použití eĉ by naznačovalo, že byl nějaký důvod k podivu nad účastí příbuzných; pouze v takovém případě by použití eĉ bylo opodstatněné.

"Eĉ ne" překládáme spojkou "ani": Ani slova! - eĉ ne unu vorton! Li ne scias ruse eĉ unu vorton /Z/ - nezná rusky ani slova. Nic nejedl ani nepil - li nenion mangis, nek trinkis; ani nejedl, ani nepil - li nek mangis, nek trinkis. (Poslední dva příklady jsou z Pumphrova Přehledu esp.mluvnice).

Eĉ klademe vždy přímo před slovo, které chceme zdůraznit: eĉ li tion ne kapablas - ani on to nedoyede; li eĉ tion ne kapablas - ani to on nedoyede. Poloha eĉ ve větě podstatně mění její smysl!

Příklady: eĉ (i, dokonce i) plej ruza vulpo en kaptilon falas /Z/; eĉ en dimancoj ne cesas laborado (i, dokonce i); zde by se však dalo použít i "ankaŭ en dimancoj...". Ale nelze použít ankaŭ místo eĉ ve větě: ŝia buŝo eĉ por momento ne fermigis /Z/. Je citelný rozdíl ve větách: 1) la prezidanto salutis la ĉeestantajn gastojn kaj (kaj ankaŭ) la klubanojn - předseda pozdravil (uvítal) přítomné hosty a (nebo i) členy klubu; 2) la prezidanto salutis... la gastojn, eĉ la klubanojn. Smysl druhé věty vlivem "eĉ" naznačuje, že předseda členy klubu normálně nevíta a že dnes učinil výjimku tím, že uvítal dokonce i členy klubu. Tuto situaci zapisovatel vyjádřil použitím "eĉ".

J. Mařík



Kaj diris Dio: estu lumo. Kaj estiĝis lumo. Kaj Dio vidis, ke ĉi tiel estas bone.

Kaj ekvidis la lumon la Diablo kaj palpebrumis pro la brilo, kaj diris: "Aŭ kio estas ĉi tio? Ĉu vi kontraŭagas min?" Kaj diris per laŭta voĉo: "estu mallumo!"

Kaj estiĝis taglumo kaj nokto je la unua tago.

Duatage Dio disigis la ĉielon de la tero kaj kreis la ĉielvolbon.

Kaj ekkoleris la Diablo en sia koro kaj diris: "estu ĉielbrua tempesto, glaciplena hajlo kaj kirlego de ventoj!"

Kaj estiĝis la ĉielvolbo kun tempesta bruo, kun hajlo kaj kun ventagoj je la dua tago.

Tiam diris Dio: "estu kontinentoj, kiuj donas sekuran grundon, estu sur ili molaj herboj kaj multaj fortaj arboj, kiuj kreskigas dolĉan frukton, kaj estu akvoj, kiuj aspergas kaj fekundigas la sekan teron."

Kaj diris la Diablo: "estu vulkanoj sur la kontinentoj, por ke ili ne fariĝu sekura grundo. Estu inundoj de la akvoj kaj estu naŭzaj vermoj en la dolĉaj fruktoj!"

Kaj daŭris la frida milito inter Dio kaj Diablo je la tria tago.

Diris tiam Dio: "estu akvaj bestoj kaj rampaj bestoj kaj flugadu birdoj super la tero kaj estu ĉiaspecaj brutoj, bovoj, ŝafoj, kokoj kaj kolomboj!"

Sed diris la Diablo: "estu ŝarkoj en la akvoj kaj vipuroj kaj lupoj sur la tero kaj estu ĉiaspecaj nocivaj bakterioj!"

Kaj estiĝis vivo kaj morto ja le kvara tago.

Kaj diris Dio: "Ni kreu homon laŭ nia propra modelo kaj simileco kaj li regu la fiŝojn de la maro, la birdojn de la ĉielo kaj la brutojn sur la tuta mondo. Jen, mi donacas al li la grendonan spikon kaj fruktodonan arbon por lia bonfarto, ke lian koron serenigu feliĉo."

Kaj vidis Dio, ke ĉio, kion Li kreis, jen, estas bona kaj taŭga al la celoj.

Sed diris la Diablo: "Ni kreu ŝtatestron kaj militestron. Advokaton, ekzekviston, patrioton kaj flatintriganton laŭ nia propra modelo kaj simileco."

Kaj vidis la Diablo, ke ĉio, kion li kreis, jen, estas malbona kaj taŭga al la celoj.

Sed li diris en sia koro: "tamen mi vane faris mian senlacan paclaboron, se la agreso de la detruema malamiko ĉion nuligas per sia perforta kontraŭago." Kaj diris laŭvoĉe al la Sinjoro:

- Efektive kial ni devas konkurenci, Dia Moŝto? Ĉu ni ne povus eble kunlabori en paca kunvivo kaj interkonsento?

- Kiel vi opinias la kunlaboron? - demandis la Sinjoro.

- Provu ni eble krei konkorde, tiamaniere, ke mi kaj vi kunlaboras en la kreado laŭ kvindek procenta kontribuo!

- Nu, estu laŭ via deziro Maldia Moŝto, - respondis la Sinjoro. - Ni kunmetu niajn kapablojn kaj kreu ni ion kune.

Kaj tiam ili distranĉis la homon al du seksoj. Estiĝis viro kaj virino.

Kaj estiĝis amo je la sesa tago por etern-eterne.

Kaj ambaŭ kreintoj vidis, ke ĉi tio kaj ĉi tiel jam estas tre bona kaj malbona kaj tre taŭga kaj je la sepa tago ili ambaŭ ripozis.



SCIENCAJ ESPLOROJ ATENTENDAJ

Konsiderante, ke interlingvistikaj esploroj havas esencan signifon por la solvo de la monda lingvoproblemo estas nepre necese evoluigi tiurilatan sciancan laboron. Tion substrekkis la internacia seminario pri sciencaj aspektoj de Esperanto en Ahrenshoop (GDR) inter la 17a kaj 23a de aprilo. La seminario komunikis, ke la ĝisnunaj spertoj kaj faktoj pruvas, ke Esp-o estas plej taŭga kiel interlingvo ankaŭ por la scienco. Tial estas necese disvastigi la aplikon de Esp-o en ĉiam pli multaj fakaj terenoj. Estas necese establi aŭ plibonigi organizajn aŭ informadajn sistemojn.

Ĉiuj naciaj kaj internaciaj kunvenoj de esp. sciencistoj devus turni sian atenton ne nur al konkretaj sciencaj problemoj, sed ankaŭ al la perspektivaj bezonoj de la scienco koncerne la uzadon de la internacia lingvo Esperanto.



Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kčs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turnigu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Koupím učebnici Esperanta od Th. Kiliana - novou nebo zachovalou: František HRUŠKA, Tr. Lidových milicí 667/81, 405 02 Děčín 5, p. 2 schr. 12.

Marie VALKONYOVÁ, 382 02 Zlatá Koruňa 106, okr. Český Krumlov - ČSSR, serĉas korespondamikojn el tuta mondo.

Zdena DOLÁKOVÁ, 382 02 Zlatá Koruňa 99, okr. Český Krumlov - ČSSR, serĉas korespondamikojn el tuta mondo.

Hungarano (42j) duĝna invalido, deziras edzigcele kontakti kun simile trafita samideanoj: István FEHER, Ut. Tánosios M. 30, 6800 HÓDMEZŐVÁSÁRHELY, Hungario.

Pollando: serĉas korespondamikojn el la tuta mondo: Katarzyna Rozycka, 13-200 DZIALDOWO, str. Pocztowa 9c/25.

• Jagoda Jaroszynska, 13-200 DZIALDOWO, str. Krotka 2/3. • Ewa Siergiej, 13-200 DZIALDOWO, str. Pocztowa 9c/1. • Teresa Kosek, 13-200 DZIALDOWO, str. Lidzbarska 30.

INFORMACE SEKRETARIÁTU

Náš sjezd začíná pronikat v podobě zvýšené aktivity do některých místních skupin. Je snaha docílit 3 000 členů. Zúčastněte se i vy! Informujte nás o svých akcích.

Sekretariát vám vyřizuje v krátkých termínech všechny vaše požadavky, dotazy a přání, pokud je to vůbec možné. Prosíme vás o stejný přístup, zejména vedoucí našich místních skupin.

Zgjemci, kteří chtějí být přítomni sjezdu našeho svazu, necht' vyplní přiloženou přihlášku. U hostů ji považujeme za závaznou až po zaplacení kongresového příspěvku, v němž je obsažena vstupenka na společenský večer a kongresové materiály. Nečekejte! Abychom vám pomohli zajistit i ubytování (objednávejte pouze v případě, že si nemůžete zajistit sami) musíme uzavřít přihlášky již do 15. října 1978. Potom nebudeme ubytování zajišťovat. Jste-li navrženi za delegáty sjezdu, odešlete přihlášku.

Začíná období výběru členských příspěvků. Chtěli bychom je uzavřít do konce roku, aby byl již při sjezdu přehled o členské základně svazu. Nečekejte, až vás vaše místní skupina vyzve. Vyhledejte ji sami! Ušnadněte nám práci. Individuelní členové mohou použít k placení členských příspěvků běžnou poštovní poukázku a vyplní následující údaje:

peněžní ústav: SBČS, pobočka Praha 2
 číslo účtu: 02 - 4632 - 7
 název účtu: ČESKÝ ESPERANTSKÝ SVAZ
 Jílská 10, Praha 1.

Objednejte si v našem sekretariátu časopisy, které dovážíme nebo vydáváme:

P A C O

- luxusní obsahem, formou i papírem ve velikosti formátu A4. Základní řada 6 čísel tištěna v BLR, ostatní doplnková v členských státech po celém světě. Roční předplatné pouze 30,-- Kčs. Zároveň s ním dostanete i separáty PACO (letos brožurku k 25. výročí MEM s názvem KONCIZE PRI MEM).

KONCIZE PRI MEM

- brožurka obsahuje historii činnosti tohoto světového mírového hnutí, kterého jsme členy. Cena za 1 výtisk 8,-- Kčs.

J U N A A M I K O

- velmi hezký časopis vydávaný pro děti a mládež, ale nejenom pro ně. Vydává Maďarský esp. svaz. Roční předplatné za 3 čísla 15,-- Kčs.

MEDICINISTAJ INFORMOJ

- známý věstník naší medicínské sekce. Vychází jako příloha STARTA, ročně 4 čísla po 16 stranách textu. Předplatné 24,-- Kčs.

DER ESPERANTIST

- výborný a věcný věstník německých esperantistů. Vydáván v NDR 6x ročně. Cena ročního předplatného 12,-- Kčs.

STARTO - tiskový orgán Českého esperantského svazu, Praha 1, Jílská 10. Řídí redakční rada: odpovědný redaktor O. Kníchal, zástupce redaktora Dr. J. Jermář, CSc, členové: J. Cink, Z. Hršel, Ing. V. Kočvara, Zd. Křimský, J. Vondroušek. Grafická úprava: M. Labašta. Vychází 6x ročně. Tisk zajištěn výrobnou Technického ústředí knihoven při SK ČSR Praha. Roční předplatné: 24,-- Kčs. Předáno do tisku: 1. září 1978.

INSIGNOJ:

..ekz. AMIKO 8,--
 ..ekz. ĀSL.ESP. 8,--
 ..ekz. EKP 8,--
 ..ekz. EŠLI 8,--
 ..ekz. GLOBO 5,--
 ..ekz. IFEF 8,--
 ..ekz. IFEK (fiškaptista) 11,--
 ..ekz. KKEI 8,--
 ..ekz. LANŠKROUN 8,--
 ..ekz. MĚLNÍK 8,--
 ..ekz. MEM 7,--
 ..ekz. OPAVA 7,--
 ..ekz. SOLENA 12,--
 ..ekz. STELO 6 aŭ 9 mm 5,--
 ..ekz. STELO 13, 24 mm 8,--
 ..ekz. STELO kun "E" .. 8,--
 ..ekz. STELO kun "E-o" 8,--
 ..ekz. TRIPINTA 8,--
 ..ekz. TŘEBÍČ 8,--

DIVERSAĴOJ:

..ekz. BONDEZIRO 2,--
 ..ekz. FLAGETO 20,--
 ..ekz. GLUMARKOJ ĈEA .. 6,--
 ..ekz. GLUM.E-O PAROL. 3,--
 ..ekz. LETERPAPERO 0,20
 ..ekz. NOMSLIPO 1,50
 ..ekz. SAKETO SILONA...15,--
 ..ekz. TRIKOTĈEMIZO .. 26,--
 ..ekz. TRIKOTĈEMIZO .. 39,--
 ..ekz. TRIKOTĈEMIZO .. 59,--
 ..ekz. NOTLIBRETO 3,--

LIBROJ:

..ekz. ENDRE ADY 6,--
 ..ekz. DE PAĜO AL PAĜO 29,--
 ..ekz. EKZERCARO CINK...15,--
 ..ekz. EN MASKOBALO... 20,--
 ..ekz. JUN.RENKONTIĜOJ 6,--


..ekz. HASANAGANINO ... 6,--
 ..ekz. FRANCA ARTO 3,--
 ..ekz. HIST.K.BIOGRAF. 6,--
 ..ekz. HUNG.SUR BILDOJ 55,--
 ..ekz. ITINEROJ 6,--
 ..ekz. JUNULARO KANTAS 5,--
 ..ekz. KANTARETO BUDĚJ. 6,--
 ..ekz. KANTO SUPER LUL. 4,--
 ..ekz. KOKO KRIAS JAM 39,--
 ..ekz. KOMENIO K. IL 4,--
 ..ekz. KONCIZE PRI MEM 8,--
 ..ekz. KRUCENIGMOJ 10,--
 ..ekz. KVAROPO 44,--
 ..ekz. APOKRIFOJ 12,--
 ..ekz. LA MONT.KRONO 30,--
 ..ekz. NOMARO DE BIRDOJ 6,--
 ..ekz. NUDA INTER LUPOJ 38,--
 ..ekz. PANORAMO KOMPL. 30,--
 ..ekz. PAŜOJ AL PL.POS.19,--
 ..ekz. LA PERD.VIZAĜO 15,--
 ..ekz. POŜATLASO 20,--
 ..ekz. E.GRAMATIKO 16,--
 ..ekz. PRAKTIKA KURSO 16,--
 ..ekz. KORESPONDA KURSO 32,--
 ..ekz. PRI LA VARMO 21,--
 ..ekz. SILEZIAJ KANTOJ 11,--
 ..ekz. TRAG.DE L'HOMO 25,--
 ..ekz. TURISTA KANTARO 20,--
 ..ekz. TURISTA VORTARO 5,--
 ..ekz. Dro KABE: la LEGOLIBRO 16,--
 ..ekz. VORTARO HROMADA 14,50
 ..ekz. VORT.E-a-pola 6,--
 ..ekz. VORTARO E-a-pola 26,--
 ..ekz. BALATONO 11,--
 ..ekz. PANOR.LUKAŠ 16,--
 ..ekz. PANOR.KOŤINEK 16,--
 ..ekz. TIEL PROFUNDA 21,--

En Subskribo:

supera sukceso
de la sportisto estas

VRCHOLNÝM

ÚSPĚCHEM
SPORTOVCE



JSOU
PŘESNÉ
MODERNÍ
HODINKY

klenoty

preciza * * moderna

▶ horloço